

Heinrich Heine,  
Lorelej'

*tradukita de Leopold Elb*

*Tiu traduko estas poste iom modifita de aliuloj, ne estas la origina traduk-versio de Leopold Elb.*

Ne scias mi, kial mi estas  
Malgaja en la kor'.  
Antikva fabelo restas  
Por ĉiam en mia memor'.

Vespero jam ekmalheliĝas,  
Fluadas la Rejn' en trankvil',  
La supro de l' monto lumiĝas  
En vespersuna bril'.

Belega knabino jen tronas  
Kun ora juvelar',  
La belan vizaĝon kronas  
Mirinde la ora harar'.

Ŝi uzas kombilon el oro  
Kaj dume kantas ŝi.  
Mirige tuŝas al koro  
Sorĉiga la melodi'.

Kaj sopiregon eksentas  
Ŝipisto dum sia vetur';  
Rifaron li ne priatentas,  
Al monto rigardas li nur.

Mi kredas, ke dronos finfine  
Ŝipisto kun sia boat',  
Kaj tion kaŭzis feine  
La Loreleja kantad'.

*Traduko de la Germana poemo "Die Lorelei" de HEINRICH HEINE (\*1797-12-13 – †1856-02-17) en Esperanton de LEOPOLD ELB (†1912-08.04).*

*Arg-2-71 (2005-02-03 19:06:30)*

*La traduko troviĝas sur paĝo 84 de la lernolibro „Post la kurso“ de Wilhelm kaj Hans Wingen, eldonita de Ludwig Pickel en Nurembergo (Nürnberg), Germanio.*